Sennacia lingvo



por

CGT

sennacia mondo

Baza esperanta kurso

“Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo.”

L.-L. Zamenhof , iniciatinto de Esperanto en letero al “Der Arbeiter Esperantist” (1910)

“Quizás para nadie en el mundo nuestra democrática lengua tenga tanta importancia como para los trabajadores, y espero que más o menos pronto sean los trabajadores el apoyo más fuerte de nuestro movimiento. Los trabajadores no sólo experimentarán la utilidad del Esperanto, sino que también, más que los demás, sentirán la esencia y la idea del esperantismo.”
L. L. Zamenhof, iniciador del Esperanto en carta al “Der Arbeiter Esperantist” (1910)

1

Bonan vesperon!



Kiu mi estas?	Mi estas Jurgo la instruisto.
Kio mi estas?	Mi estas sindikatisto. instruisto.
Kia mi estas?	Mi estas juna. kontenta.
Kiel mi estas?	Mi estas surpiede.

Kiu – persono

Kio – objekto

Kia – kvalito

Kiel – maniero

Persona pronomo

Unua persono Dua persono

-Mi estas Jurgo. Kiu vi estas?
-Mi estas Roza.
-Mi estas Jurgo kaj vi estas Roza.

Konjunkcio

-Roza, kio vi estas?

Demanda vorto

-Mi estas hispana. Ĉu vi estas hispana?

Nea vorto

-Ne, Roza, mi estas franca.
-Ha, mi estas hispana kaj vi estas franca. Ĉu ne?

Jesa vorto

-Jes, vi estas hispana kaj mi estas franca.



-Bonan vesperon, kamarado. Mi nomiĝas Jurgo kaj mi estas kataluna. Ĉu vi estas ankaŭ kataluna?

-Ne, kamarado. Mi ne estas kataluna. Mi estas franca.

vesperon
tagon
matenon

kamarado
kamaradino
sinjoro
sinjorino
samideano
samideanino

Jurgo
Antono
Ludoviko
Anĝelo
Mario
Marjo
Henriko
Rozo

kataluna
hispana
franca
itala
laboristo
sindikatisto
kemiisto
vendisto
purigisto
mekanikisto
lernanto
instruanto

Personaj Pronomoj

Mi	1a persono
Vi	2a persono

Finaĵoj

-o	substantivo
-a	adjektivo
-e	adverbo
-as	verbo

Demandaj vortoj

Kio	objekto
Kiu	persono
Kia	kvalito
Kiel	maniero
Ĉu	ne-K demando

Respondaj vortoj

Jes
Ne

2

Se mi estas bela, (tiam) mi ne estas malbela.
Se mi estas malbona, (tiam) mi ne estas bona.
Se vi estas lerta, (tiam) vi ne estas mallerta.
Se vi estas malgranda, (tiam) vi ne estas granda.





Mi estas laboristo. Vi estas laboristo. Vi kaj mi estas laboristoj.

Mi kaj vi estas **ni**.

Mi kaj vi estas laboristoj, sekve **ni** estas laboristoj.

Personaj pronomoj

Unua persono
singularo: **mi**
pluralo: **ni**
Dua persono
singularo: **vi**
pluralo: **vi**

Mi estas esperantisto — Mi estas esperantistino

Ni estas geesperantistoj

Mi estas laboristo — Mi estas laboristino

Ni estas gelaboristoj

Kamaradoj!! — Kamaradinoj!!

Gekamaradoj!!

Mi estas viro. — Mi estas virino.

Mi estas homo. — Mi estas homo

Ni estas homoj.

Bonan vesperon, mi estas sindikatan(in)o.	Ĉu vi estas ankaŭ sindikatan(in)o?
Jes, koleg(in)o, mi ankaŭ estas sindikatan(in)o.	Sekve ni estas sindikatan(in)oj.
aŭ	
Ne, koleg(in)o, mi estas sindikatan(in)o.	Sekve ni estas gesindikatanoj.

Kolego
Amiko
Kamarado
Samideano
Kunulo
Sinjoro

Sindikatano
Laboristo
Lernanto
Esperantisto
Policano
Masonisto
Studento
Burokrato
Artisto
Anarĥiisto (Anakiisto)
Liberecano
Ŝoforo
Fabrikestro
CGT-ano (co-go-to-ano)
CNT-ano (co-no-to-ano)
SAT-ano (satano aŭ so-a-to-ano)

Finaĵoj

-o	substantivo
-a	adjektivo
-j	pluralo
-as	verbo
-e	adverbo

Pronomoj

mi	1a	persono singulara
ni	1a	persono plurala
vi	2a	persono

Infiksoj

-in-	virineco
-ist-	profesio
-an-	aparteno

Numeraloj

Bazaj		Ordaj	
1	unu	1a	unua
2	du	2a	dua
3	tri	3a	tria
4	kvar	4a	kvara
5	kvin	5a	kvina

Prefiksoj

mal-	kontraŭo
ge-	ambaŭseksa paro

3

posesiva adjektivo

Saluton, kamarad(in)o, mia nomo estas Jurgo, mi loĝas en Barcelono kaj laboras en Martorell.
Ĉu vi? Kie vi loĝas kaj laboras?

Saluton, kamarad(in)o, mi nomiĝas Jurgo, mia loĝejo estas en Barcelono kaj mia laborejo en Martorell.
Ĉu la viaj? Kie estas via loĝejo kaj via laborejo?

posesiva pronomo

loko kie oni loĝas

mi	mi-a	mi-a-j
vi	vi-a	vi-a-j
ni	ni-a	ni-a-j

Labor-as	labor-ej-o
Loĝ-as	loĝ-ej-o
Lern-as	lern-ej-o
Verk-as	verk-ej-o
Manĝ-as	manĝ-ej-o
Muzik-as	muzik-ejo
Leg-as	leg-ej-o



La kato ĉasas muson.
Kiu ĉasas la muson? La kato.
Kiun ĉasas la kato? La muson

La eta kato ĉasas grandan muson.

Grandan muson ĉasas la eta kato.
Grandan muson la eta kato ĉasas.
La eta kato grandan muson ĉasas.

La eta kato ĉasas grandajn musojn.

Kiu	Kiu-n	Kiu-j-n
Kio	Kio-n	
Kia	Kia-n	Kia-j-n
Labor-o	Labor-o-n	Labor-o-j-n
Leter-o	Leter-o-n	Leter-o-j-n
Kat-o	Kat-o-n	Kat-o-j-n
Bel-a	Bel-a-n	Bel-a-j-n
Lert-a	Lert-a-n	Lert-a-j-n
Bon-a	Bon-a-n	Bon-a-j-n
Mal-bon-a	Mal-bon-a-n	Mal-bon-a-j-n

-Ĉu vi legas belan libron?
-Jes, mi legas belan libron. Ĉu vi? Kion vi legas?
-Mi legas seninteresan gazeton.

legi
skribi
verki
manĝi
trinki
serĉi
deziri
havi
aĉeti

bela
malbela
bona
interesa
freŝa
kolorplena
granda
eta
multekosta
simpatia
eksterlanda
bongusta

libro
gazeto
letero
oranĝo
pomo
lakto
akvo
knabo
knabino
juvelo
legi
ripozi
skribilo

4



Vi alvokis vian amikon kaj nun vi parolas kun li.
Vi alvokis vian amikinon kaj nun vi parolas kun ŝi.
Vi alvokis viajn (ge)amikojn kaj nun vi parolas kun ili.

Vi legis libron kaj nun vi komentarias ĝin.
Vi legis librojn kaj nun vi komentarias ilin.

Personaj pronomoj

Singulara		Plurala
mi	1a persono	**ni**
vi	2a persono	**vi**
li	3a persono **viro**	
ŝi	3a persono **virino**	**ili**
ĝi	3a persono **aĵo**	

Ĉu vi manĝis pomojn?
Jes, mi manĝis pomojn kaj mi ŝatas ilin.

legi	la libro	ŝati	li
koni	Mikaelo	malŝati	ŝi
vidi	la sindikatist(in)o	alparoli	ĝi
manĝi	pano	inviti	ili
trovi	la gazeto	komentarii	
alvoki	(ge)amik(in)o	manĝi	



Se mi havus monon, mi aĉetus ŝipon.
Lernu naĝi kaj vi ne **bezonos aĉeti** ŝipon.

Temporilata verbformo plus infinitivo

Kiam mi estis infano, mi ludis surstrate.
Poste, kiam mi estis knabo, mi vizitis lernejon.
Nun mi laboras en fabriko, sekve mi estas laboristo.
Baldaŭ mi emeritiĝos, ĉar mi jam maljuniĝas.
Kaj finfine mi mortos kaj oni entombigos min.
Tia povus esti la historio de multaj (preskaŭ ĉiuj) gelaboristoj.

Verbaj tempoj

-as	prezenco	as-tempo	estanteco
-is	preterito	is-tempo	estinteco
-os	futuro	os-tempo	estonteco
-i	infinitivo	i-moduso	
-us	kondicionalo	us-moduso	
-u	imperativo	u-moduso	volitivo

5


Kaŭza demandovorto (adverbo)
-Kial vi estas sindikatisto?
-Ĉar mi malamas la maljustecon.
Kaŭza respondovorto (konjunkcio)
-Kial vi estas sindikatisto?
-Mi malamas la maljustecon, tial mi iĝis sindikatisto.
Kaŭza adverbo

-Kial vi estas sindikatist(in)o?
-Ĉar mi malamas la maljustecon.
-Ĉu vi estas sindikatist(in)o, ĉar vi malamas la maljustecon?
-Jes, mi malamas la maljustecon, tial mi iĝis sindikatist(in)o.

sindikatist(in)o
artist(in)o
esperantisto
scienculo
fervojisto
kuracisto
instruisto
romanisto
maristo
komputikisto

amas
malamas
ŝatas
malŝatas

justeco
maljusteco
beleco
lingvo
kono
homaro
malsanulo
vojaĝo
nesciado
literaturo
navegado
tekniko
aventuro

-Iam mi estis en Japanio.
-Kiam vi estis en Japanio?
-Mi estis en Japanio dum la Someraj Olimpiaj Ludoj.
-Ĉu vere vi estis tiam en Japanio?
-Jes, mi estis en Japanio, kiam okazis la Someraj Olimpiaj Ludoj.

Tempaj tabeladverboj

nedifina	**i-am**
montra	**ti-am**
demanda	**ki-am**
kolektiva	**ĉi-am**
nea	**neni-am**

-Ĉiam mi deziris viziti Parizon, sed mi vizitis ĝin neniam.
-Certe, iam vi vizitos Parizon.

viziti
ludi
legi
kanti
verki
trovi
akiri

Parizo
Universitato
esperanta kurso
ŝako
opero
romano
sorto
riĉeco
poemo
saĝo
Novjorko
mono
Don Kiĥoto

Tabelvortoj

	loko	tempo	kaŭzo	maniero	kvanto	individuo	aĵo	eco	posedo
nedifinaj	**ie**	**iam**	**ial**	**iel**	**iom**	**iu**	**io**	**ia**	**ies**
montraj	**tie**	**tiam**	**tial**	**tiel**	**tiom**	**tiu**	**tio**	**tia**	**ties**
demandaj	**kie**	**kiam**	**kial**	**kiel**	**kiom**	**kiu**	**kio**	**kia**	**kies**
kolektivaj	**ĉie**	**ĉiam**	**ĉial**	**ĉiel**	**ĉiom**	**ĉiu**	**ĉio**	**ĉia**	**ĉies**
neaj	**nenie**	**neniam**	**nenial**	**neniel**	**neniom**	**neniu**	**nenio**	**nenia**	**nenies**
	adverboj					pronomoj kaj adjektivoj			

6



La rilatpronomo prenas la finaĵon laŭ sia funkcio en la subordigita frazo kaj havas la sama nombro ol la reprezentato.


Persona pronomo (subjekto)
Persona pronomo (subjekto)
objekto
objekto
Mi atendas iun homon, li verkis tiun romanon
Ĉefa frazo
Ĉefa frazo
reprezentato (objekto)
rilatpronomo (subjekto)
Mi atendas la homon, kiu verkis tiun romanon.
Ĉefa frazo
Subordigita frazo
Tie estas la homo, kiu verkis tiun romanon
reprezentato (subjekto)
rilatpronomo (subjekto)
Tie estas la homo, kiun vi atendas.
reprezentato (subjekto)
rilatpronomo (objekto)
Mi ankaŭ legis la romanon, kiun verkis tiu homo.
reprezentato (objekto)
rilatpronomo (objekto)

Ĉu vi legis iun el la libroj, kiujn verkis Ŝekspiro?
Jes, mi legis Hamleton, kies verkinto estis Ŝekspiro.

legi	libro	Ŝekspiro	Hamleto
aŭdi	simfonio	Goya	Don Kiĥoto
koni	kanto	Beethoven	Ĥora Simfonio
spekti	filmo	Ĉajkovski	La lago de la cignoj
ŝati	teatraĵo	Cervantes	La pianisto
	romano	Polanski	Ĝenerala kanto
	baleto	Nerudo	La pafmotigadoj de la 3a de majo
	pentraĵo	Sartre	La senvesta belunino
		Garcia Marquezo	La naŭzo
			Cent jaroj da soleco

Mi pensas: “la muzikfarado estas malfacila arto”. → rekta stilo

subordiga konjunkcio ←

Mi pensas, ke la muzikfarado estas malfacila arto. → malrekta stilo

→ subordigita frazo

Li diris: “Mi vojaĝas al Barcelono”.
Li diris, ke li vojaĝis al Barcelono.

Ŝajne morgaŭ pluvos.
Ŝajnas, ke morgaŭ pluvos.

7


La hundo estas pli granda ol la kato.
kompargrado
enkondukas komparaton
La elefanto estas la plej granda el la tri.
superlativo
enkondukas komparaton
La hundo estas malpli granda ol la elefanto.
La kato estas la malplej granda el la tri.
La kato estas tiel rapida kiel la hundo.
egaleco
enkondukas komparaton
La kato estas tiel lerta kiel rapida.
La hundo havas pli da grandeco ol la kato.
kompargrado
La kato havas malpli da grandeco ol la hundo.
La kato havas tiom da rapideco kiom la hundo.
egaleco
enkondukas komparaton
La kato havas tiom da lerteco kiom da rapideco.
enkondukas komparaton

Komparativo

... **pli** [adjektivo aŭ adverbo] **ol** [sama aŭ malsama subjekto]
... **tiel** [adjektivo aŭ adverbo] **kiel** [sama aŭ malsama subjekto]
... **malpli** [adjektivo aŭ adverbo] **ol** [sama aŭ malsama subjekto]

... **pli da** [substantivo] **ol** [malsama subjekto]
... **pli da** [substantivo] **ol da** [sama subjekto]
... **tiom da** [substantivo] **kiom** [malsama subjekto]
... **tiom da** [substantivo] **kiom da** [sama subjekto]
... **malpli da** [substantivo] **ol** [malsama subjekto]
... **malpli da** [substantivo] **ol da** [sama subjekto]

Absoluta superlativo

... **la plej** [adjektivo].

Relativa superlativo

... **la plej** [adjektivo] **el** [komparkampo]

-Ĉu vi ŝatas pli la televidadon ol la teatron?
-Mia (mal)plej ŝatata amuzo estas la kino.

la televidilo
la teatro
la kino
promeni
sportumi
Garcia Marquezo
Kristiano Ĵako (Christian Jacq)
J.R.R. Tolkien (-on)
Kantio (Kant)
Heideggero
Hegelo
Bethoveno
Stravinski (-on)
Granados (on)
Antono Banderas
Mikaelo Douglas
Karlo Bronson
Ŝaron Stone

Angelina Jolie
Georgo Buŝ
Zapatero
Rajoy
Diagonalo
Avangardo
La Ĵurnalo
Ruĝa kaj Nigra
Monato
Katalunujo
JoMo
Madonna
Domingo

amuzo
romanisto
aktor(in)o
politikisto
ĵurnalo
gazeto
filozofo
kantisto
muzikkomponisto

8

La kato, kiu fuĝas, savas la vivon.
La fuĝanta kato savas la vivon.

La kato, kiu fuĝis, savis la vivon.
La fuĝinta kato savis la vivon.

La kato, kiu fuĝos, savos la vivon.
La fuĝonta kato savos la vivon.

aktiva participo
(adjektiva rolo)

	Participoj	
	aktivaj	pasivaj
as-tempo	**-ant-**	**-at-**
is-tempo	**-int-**	**-it-**
os-tempo	**-ont-**	**-ot-**

La kato manĝos muson, kiun ĝi ĉasas.
La kato manĝos ĉasatan muson.

La kato manĝas muson, kiun ĝi ĉasis.
La kato manĝas ĉasitan muson.

La kato manĝos muson, kiun ĝi ĉasos.
La kato manĝos ĉasotan muson.

pasiva participo
(adjektiva rolo)

Mi estas skribanta leteron. Letero estas skribata de mi.	Nun mi skribas
Mi estas skribinta leteron. Letero estas skribita de mi.	Nun mi jam skribis
Mi estis skribanta leteron. Letero estis skribata de mi.	Je iu pasinta tempo mi skribas
Mi estis skribinta leteron. Letero estis skribita de mi.	Je iu pasinta tempo mi jam skribis
Mi estis skribonta leteron. Letero estis skribota de mi.	Je iu pasinta tempo mi ankoraŭ ne skribis, tamen nun mi jam skribis
Mi estas skribonta leteron. Letero estas skribota de mi.	Nun mi ankoraŭ ne skribas, sed mi faros tion (eble baldaŭ)
Mi estos skribanta leteron. Letero estos skribata de mi.	Je iu estonta tempo mi skribas
Mi estos skribinta leteron. Letero estos skribita de mi.	Je iu estonta tempo mi jam skribis
Mi estos skribonta leteron. Letero estos skribota de mi.	Je iu estonta tempo mi ankoraŭ ne skribis, tamen mi faros tion en pli posta tempo

verboj

absoluta tempo	relativa tempo
estas	**-ant-**
estis	**-int–**
estos	**-ont-**
	-at-
	-it-
	-ot-

Tiun ĉi lernilon verkis Jurgo Alkasaro, ano de la Sennacieca Asocio Tutmonda, por la Plursektora Sindikato de la Malalta Ljobregato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro de Katalunujo (Sindicat d'Oficis Varis del Baix Llobregat de la Confederació General del Treball de Catalunya) je la aŭtuno de la 2008a jaro.

Ĉiu rajtas uzi kaj modifi tiun lernilon laŭ *Creative Commons* permeso.

Plena permesilo